HAMBURG Esperanto

6/2008

Oktobro/Novembro/Decembro

Bulteno de Hamburga Esperanto-Societo r. a.

# Nia lasta festo en la Esperanto-Domo




**Hannelore Brunow, 66-jara**

Hamburga Esperanto-Societo kvazaŭ uzurpis la naskiĝtagan feston de ***Hannelore Brunow*** ĉar la dato estis la sola konvena por la lasta festo en la *Esperanto-Domo*. Tiel ĝi fariĝis ne funebra kunveno sed gaja adiaŭo kun proks. 40 vizitantoj. Dankon al Hannelore, ke ŝi rezignis pri la individua festo. Kvankam kelkaj membroj nur aprezas ŝin kiel purigistino, la klubo kaj la klubejo dum la pasintaj 20 jaroj al ŝi ĉiam estis pli gravaj ol personaj sentemoj.

►p. 4-5

## Esperanto Hamburg ehh

Eldonanto:
Hamburga Esperanto-Societo r. a.

Poŝta adreso:
Klaus-Groth-Str. 95
D-20535 Hamburg

Tel: 0160 / 17 33 980
Konto: GLS Gemeinschafts-bank eG • BLZ 430 609 67
Konto-n-ro 200 67 16 500

**Prezidantino**:
Kerstin Baasch
Scharpenmoor 74 e
22848 Norderstedt
baasch@esperanto-hamburg.de

**Redaktoro**:
Benno Klehr
Winterhuder Weg 32
22085 Hamburg
Tel: (040) 43188347
klehr@esperanto-hamburg.de

**Interreta prezento**:
Frank Merla
www.esperanto-hamburg.de
merla@esperanto-hamburg.de

**Redaktofino de n-ro 1/2009:**
**15 - 11 - 08**

## Karaj legantoj,

nun jam efektiviĝis la "translokiĝo" de la Hamburga kunvenejo. Niaj unuaj ĵaŭdaj vesperoj en la *kulturbutiko* jam okazis kaj ni nun ĉiuj devas alkutimiĝi al novaj cirkonstancoj. Estas strange, ke ni ne plu povas libere decidi pri la dato de iu kunveno – ni devas demandi, kiam estos iu salono libera por ni. Pro tio la estrarkunsido de HES okazis ne kiel kutime ĵaŭde antaŭ la klubvespero, sed dum merkredo. Nian Zamenhoffeston ni ne povos okazigi la 6an de Decembro, kiel ni estis planintaj, sed nur la 20an. Do niaj interkonsentoj pri la datoj kun Herzberg kaj Berlin ne plu funkcias. Pardonu, Berlinanoj!
Tamen ne ĉio ŝanĝiĝis: Ni plu laboras por la disvastigo kaj instruado / aplikado de nia lingvo. Kaj mi persone daŭrigas pensi "terure", pretigante tute novan krucvortenigmon, kiu ekskluzive aperos en la venonta eldono de *Esperanto Hamburg*.

*Benno Klehr*

## Sentenco

Espero estas la ĉielarko
trans la torenton de la vivo.

*Friedrich Nietzsche*

# La "Patrino" fariĝos 80-jara



Elsbeth Wielgus (2004)
Membro de HES ek de 1948

La "Patrino" de la klubo, la 9an de Decembro festos la 80an datrevenon de sia naskiĝo. Samtempe festos nia iama kuiristino, nia iama dommastrino, nia iama prezidantino kaj nia Honora Membro: **Elsbeth Wielgus**.

Jam en 1976 ŝi kuiris en la luita klubejo en Vehrenkampstraße (Hamburg-Langenfelde). Titolpaĝajn bildojn ŝi jam ricevis en 1988 kaj 2004.




Ŝi diris, ke ŝi ne ŝatas tion, do ĉi-foje ŝi estas nur "la belulino sur paĝo 3".

Kara Elsbeth,
ni deziras sanon kaj bonfarton!
– kaj diras dankon pro 60 jaroj de engaĝiĝo.

## Atenton!

Ek de Septembro 2008 ĉiuj kunvenoj de

**Hamburga Esperanto-Societo**

okazas en la *Kultur-Butiko*

***Kulturladen St. Georg*** **• Alexanderstr. 16 • 20099 Hamburg**

# Nia adiaŭa festo en la klubejo

Mia 66a naskiĝtaga festo samtempe estis nia lasta festo en nia klubejo. Kiel ĉiam: Multa laboro, multa plezuro kaj kiam ĉio estis denove pura, la malgranda dormiga trinkaĵo. Kiam ĉio estis formanĝita, formetita kaj ordigita, ni staris ĉe la bufedo: Benno, Tiggy, Volker kaj mi. Nur Elsbeth kaj Burkhard mankis. Stranga premo en la gorĝo: Ĉio estas pasinta. Kio fariĝos el nia amikeco, el niaj belaj horoj en la klunbejo, kvankam plej ofte ligita kun multa laboro?

Baldaŭ estos meznokto. Kiel sentas la aliaj? "Meznokta rondo!" mi interrompis la babiladon de *miaj knaboj*. "*Meznokta Rondo*, ni trinku la *antaŭdorman trinkaĵon*." Grandaj okuloj rigardis min. Tiggy saltis de la "skandala gasteja seĝo", rapide glasojn kaj ion trinkeblan. "Benno, ja ekzistas ia certa kanto. Kiel tekstas?" Benno ekkantis "Je via sano, samideano" kaj ni brue kunkantis. Jes, tio estis. Iom da silento, tiam iom post iom revenis la memoroj.
Ĉu vi memoras, kiam ni renovigis la salonon? Meze en la labora malpuraĵo ni sidis, sed ni manĝis nobele kun tablotuko, belaj teleroj kaj kandeloj. Ĝuinda, la lazanjo de Volker. "Ha, kaj Volker sur la ŝtupetaro" eksplodis Tiggy, "Volker malgrimpis de la ŝtupetaro kaj mallerte paŝis per la dekstra piedo meze en la blankan farbon." Ni ridegis. "La subjupo de Elsbeth, kiu malrapide glitis malsupren, kaj ŝi unue ne konstatis tion. Kia dia Bildo!" Glaseton je la sano de Elsbeth. "Jes, kaj la vizaĝo de Burkhard, kiam li vidis ke li fiksis la tenilon sur la malĝusta flanko de la pordo." Glaseton memore al Burkhard.



**Burkhard** (1945 – 1999)

Unu anekdoto, unu memoro post la alia. Ni adiaŭas.

"Benno, ni ankoraŭ devas aŭdi la *Anĝelon Alois*." denove mallonga silento. "Jes, Alois en la ĉielo." La furora prezentaĵo de Benno. Tiel estis en pasinteco:
"Rapide, Benno, prenu la Folion. Ek, malantaŭ la bufedon."
Reduktita lumo. "Bieron por Benno!"
La spektantoj serĉis seĝojn, la salono mallumiĝis, streĉita atendado al "Alois en la ĉielo".
Multfoje aŭdita, ĉiam denove ekscitiga. Ĉiam la krono de sukcesa festo.

Kun krako la lasta *skandala seĝo* forpasis. La vizaĝo de Tiggy estis taŭga por scenejo.
Do, nun ni povas iri hejmen, meznokto pasis.

La lasta malŝaltas la lumon.
Fartu bone, klubejo.

*Hannelore Brunow*

# Nia lasta festo en la Esperanto-Domo



**Rudi, Rainer, Werner, Wolfgang**



**Sylwia, Gerda, Horst, Erika,** (Reinhold)

Por nia lasta festo, adiaŭa festo por klubanoj kaj datreveno por Hannelore kaj familio/amikoj, ni havis ekscelentan bufedon, kiu jam komenciĝis posttagmeze kun kafo kaj kuko. Vespere *Ralph Glomp* kantis por *Hannelore* personan kanton pri la 66a jaro laŭ teksto de *Benno Klehr.*
Alia kantanta gasto estis *Wolfgang Reisberg*, kiu jam foje kantis ĉe ni ankaŭ en Esperanto.
Ĉeestis pli ol 40 personoj tiun feston, kiu daŭris ĝis noktomezo.



**Ralph kantas**



**Eva kaj Volker**



**Benno kaj Gerd**

# Oktobro 2008

**2** **Ni kune ludas** — Lingvo-ekzercado per sociaj ludoj

**9** **Esperanto : Pasporto al la tuta mondo**

Unua parto de DVD-kurso por instrui kaj lerni la internacian lingvon.

**16** *Jürgen Wulff kaj Ralph Glomp:* **Vojaĝo tra Nederlando**

**23** *Mariko Aoŝima kaj Gerald Roemer:* **Bildoj pri Roterdamo**

Nederlando estas la lando de la Universala Kongreso 2008. Pro tio nia havas plurajn prelegojn pri tiu temo.

**30** *Rudi Haberland:* **Policistoj en Amsterdamo dum la dua mondmilito**

Rudi mem vivis en Nederlando kaj povas rakonti el propraj spertoj.

# Novembro 2008

**6** *Jutta Sültz:* **Lisbono**

La malmulta konata eŭropa ĉefurbo Lisboa [liʒ'βoɐ]

**13** *Benno Klehr:* **Ĉu konjunktivo aŭ subjunktivo?**

Lernantoj ofte havas demandojn, speciale kiam ili tradukas. Speciala temo: Kondicionalo

Ĵaŭdaj klubvesperoj: 19.00 h
programo 19.30 h, salono 2

en Kulturladen St, Georg
Alexanderstr. 16 • 22099 Hambĝ.

## Novembro

**20** *Filmo:* **Venu rapide homoj** Unua akto (ĉ. 60min.)

Muzika komedio pri la vivo de Sankta Francisko el Asizo, rakontita per prozo kaj muziko.

26 Estrarkunsido

**27** *Filmo:* **Venu rapide homoj** Dua akto (ĉ. 60min.)

Dua parto de la filmo de *La Nuova Compagnia* el Blera (Italio).

## Decembro 2008

**4** *Rudi Haberland:* **Kiu estas Sinterklaas?**

Nederlandaj kutimoj

**11** Esperanto : **Pasporto al la tuta mondo**

2a parto de la prezento

**18** *Aleksandro Puŝkin:* **La neĝa blovado**

Registrita legado de *Stano Marček* (40 min)

*1799 en Moskvo
†1837 en Peterburgo Z

**20** **Sabato, 18a horo**
**Zamenhoffesto** (vd. p. 3)

Zamenhoffestoj de aliaj Esperanto-Grupoj:
22.11. Neubrandenburg
13.12. Herzberg
20.12. Berlin

## Januaro 2009

**8** *Werner Bormann:* GIL (Gesellschaft für Interlinguistik)

Pri la renkontiĝo de GIL fine de Novembro 2008 en Berlin: „Esperanto kaj aliaj lingvoj en komparo“



La ĉi-jara Zamenhoffesto okazos en la *Kultubutiko*, kie ankaŭ okazas niaj ĵaŭdaj kunvenoj. La festo okazos en granda salono en la **ter-etaĝo** apud la gastejo. Pro la vendo de la domo ni tro malfrue povis plani kaj devis elekti la solan sabaton, kiam la granda salono ne jam estis okupita.
Bonvolu anoncu vian partoprenon ĉe Ralph Glomp Tel. 68 91 36 63 aŭ post@ralph-glomp.de. La Manĝo kostas € 10,– (+ € 2 por vino aŭ biero).

**Zamenhoffesto de Hamburga Esperanto-Societo**
dato: 20.12.2008 • 18.00h Loko: Kulturladen St. Georg
Alexanderstr. 16 • 22099 Hamburg

---

## Festivalo de la kulturoj



**Volker kaj Gisela – Sylwia kaj Pia informas – Peggy kaj Kerstin antaŭ provleciono**

La *festivalo de la kulturoj* de nove okazis de la 12a ĝis 14a de Septembro sur la universitata placo, proksime al la *Auditorium Maximum*. Ankaŭ ĉi-jare ni havis budon tie por prezenti nian lingvon, kaj varbi por provleciono en la *Kulturbutiko*, kiu okazis la 15an de Septembro. Peggy Ley lerte prezentis bazajn konojn pri la lingvo helpe de bone farita komputila prezentaĵo.
Bedaŭrinde multaj, kiuj enskribis sin en liston de partoprenantoj, fakte ne venis.

### Kurso en la *Kulturbutiko*

*Frank Merla* gvidas kurson en nia nova renkontejo la *Kulturbuitko*. Ĝi okazas **marde** de la 17a ĝis la 19a horoj.

# Vendita, purigita kaj transdonita

La domo de Hamburga Esperanto-Societo nun estis transdonita al la nova posedanto, kiu uzos ĝin kiel buroo por organizi sportajn aranĝojn – ekz-e la *Hamburgan Duonmaratonon* kun 5280 partoprenantoj en 2008. La meblojn kaj preskaŭ ĉion alian la nova posedanto transprenis, eĉ aĉetis.



**Hannelore, Benno, Ralph, Kerstin, Jürgen, Mariko kaj Gerald post la laboro por paki niajn aĵojn kaj purigi.**

Post pakado ni purigis la tutan domon por transdoni al s-ro Schölermann. Nur restis "kelkaj" kartonoj (50), kiujn ni rajtas lasi en la domo (kontraŭ monata lupago), ĝis ni estos trovintaj alian ejon por niaj biblioteko kaj arĥivo.

# Hamburg-Enigmo

Ne kredu, ke mi iel manipulis tiun foton. Mi faris la foton 2001 apud la urbodomo en Neu-Ulm, kie naskiĝis *Edwin Scharff,* la skulptisto. Sur aktualaj fotoj estas malaperinta tiu kopio de la Hamburga artverko.

Kie en Hamburg troviĝas tiu ĉi skulptaĵo?

*Benno Klehr*



## Flagge zeigen für Esperanto

Gerhard Hein wurde von der „Initiative Bürger für Europa“ als Mitglied aufgenommen. Die Initiative steht unter der Schirmherrschaft der Vertretung der Europäischen Kommission in Deutschland. In einem Umfeld von namhaften Persönlichkeiten und Organisationen, die für den Europagedanken eintreten, ist nunmehr auch Esperanto präsent. Näheres siehe unter www.buergerfuereuropa.de/mitglieder/mitglieder.htm .

Gerhard Hein
Scheideholzweg 65a
21149 Hamburg
Tel.: (040) 701 217 69
Fax: (040) 701 217 79
http://www.stiftung-europaverstaendigung.de



## Solvo de Hamburg-Enigmo

La skulptaĵo staras sur eta moleo en la lago *Ekstera Alster* apud *Schwanenwik*. *Edwin Scharff* estis la ĉefo de la *arta altlernejo* (HfbK) en **Hamburg**, kie li mortis en 1955. *Benno Klehr*

# Pardonpeto

En 2007 mi ne gratulis al du membroj de nia klubo, okaze de ilia 80-jariĝo:

**Heinrich Wielgus** kaj **Volo Gültling**

Do nun finfine miaj bondeziroj! *Benno*

# Misinformo

Multaj germanoj kredas, ke la robo de la *Kristnaska Viro* (*S-ta Nikolao)* en ruĝa kaj blanka koloroj estas inventaĵo de la firmao *Coca-Cola*. Jes ja, estas la koloroj de la kompanio, sed Nikolaon por sia varbado ili nur malkovris en 1931, dum jam en 1927 **New York Times** priskribis "standardigitan" Nikolaon. Ankaŭ en Germanio *Nikolao* jam antaŭ *Coca-Cola* estis ruĝa-blanka. BK

La momenta banka krizo memorigis min pri la suba teksto, kiun mi supozeble ricevis dum la IJK 1975. (Klarigo:
kataklismo = monda katastrofo;
hekatombo = amas-tombo)

*Benno Klehr*

## La Malespero

*Rosa Meyer,* 1933

En la mondon venis nova krizo
Tra la mondo iras la bojkoto
Per flugiloj de la civilizo
Ni nun ĉiuj flugas al bankroto
Jen Usono ne plu soifanta
Ĝi la mondan ŝiras organismon
Al la mond′ eterne kreditanta
Ĝi promesas bankan kataklismon.

Sub la sanga signo de l' mizero
Kolektiĝas lacaj savtalentoj
Kaj rapide kreskas la ofero
Per la bono de la esperantoj
Forte staras muroj de doganoj
Inter la popoloj dividitaj
Sed ni ĉiuj dancas sur vulkanoj
Per la danca flamo ekscititaj.


Kun ŝakala digno kun lamento
Kunprenante ĉiu sian bombon
La popoloj faros sen konsento
Unu grandan mondo-hekatombon
Niaj eminentaj registaroj
En parolo vana ne laciĝos
Ĝis kruela sonĝo de barbaroj
Por eterna pen' efektiviĝos.

## Gastlibro

Dum la pakado de "niaj aĵoj" post kiam ni vendis la Esperanto-Domon, al mi enmaniĝis la malnova gastlibro de la klubo, fakte la gastlibro de la

**Unua Esperanto-Grupo Verda Stelo.**

(tiel ili mem skribis!) La grupo estis unuiĝinta el du antaŭaj kluboj: La *Unua Esperantista Grupo Hamburgo-Altona'* (fondita en 1904) kaj la *Esperanto-Grupo Verda Stelo* (fondita en 1909). Sur la unua paĝo troviĝas enskriboj el la jaro 1928. Unu subskribon mi tuj rekonis. La sama subskribo ankaŭ troviĝas en la aktuala gastlibro, ankaŭ sur la unua paĝo. Ĝi estas el la jaro 1988, kiam okazis la inaŭguro de la Buroo por Eŭropa Interkompreniĝo en la Esperanto-Domo. La aspekto de tiu subskribo ne ŝanĝiĝis dum 60 jaroj:



Hans Ŝütt (kiel li mem foje skribis) estis membro ek de 1926 kaj restis membro de Hamburga Esperanto-Societo ĝis sia morto en 1993. Li estis Esperantisto el la skolo de "sankta devo".

*Benno klehr*

# Bona komenco en nova renkontejo

La nova renkontejo troviĝas en bone atingebla, kvieta (unudirekta) strato en la kvartalo St. Georg. La plej proksima haltejoj estas de la linio U1, **Lohmühlenstraße**, aŭ, samnome, de la rapid-busoj 35 kaj 36. Sed ankaŭ uzantoj de la linio U3 aŭ U2 povas atingi la renkontejon piedire, elirinte la liniojn ĉe stacio **Berliner Tor** kaj de tie iri inter kvin kaj dek minutojn (dependas de la kapablo kaj volo).
Kiu venas horeton pli frue ol la komenco de la programo eĉ povas ĝui alian avantaĵon, nome la restoracieton kaj ties belegan, moderat-prezan kuirejon por preni vespermanĝon.

La unuaj kunvenoj en tiu afabla loko – dankon denove al Hannelore, ke ŝi tiel insiste rekomendis al ni tiun ŝancon – estis bone vizititaj.

La komencan vesperon dekses klubanoj venis por sperti raporton de Sylwia pri junulara kongreso en Szombathely, Hungario.

Ankaŭ la filmon „La Patro", alportita de Albert Bielenberg, la duan ĵaŭdon spektis dekses personoj. Inter aliaj gasto Anna Gamaleja, rusa kuracistino, loĝante en Berlino kiu vizitis Hamburgon por partopreni kuracistan kongreson kaj renkonti Hamburgajn Esperantistojn.



**Anna Gamaleja**

Mi antaŭĝojas venontajn renkontiĝojn, kaj esperas, ke ankaŭ dum la sekvontaj kunvenoj tiom multaj de ni montras al la aliaj vizitantoj de KulturLaden, ke Esperanto vivas kaj allogas ankaŭ pro la programo.

Mi do legigas al vi du etajn petojn, karaj geamikoj: partoprenu la programon kiel eble ofte (eble ankaŭ aktive preparante programeron?) kaj estu akurataj. Ne nur por ĝui la bongustan manĝaĵon, sed ankaŭ por ne ĝene interrompi la programon.

Peggy Ley